

ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

Kunmetis
Ĉif Toŝio.

No. 10-11.
Prezo 0,20 Sm.

Japanaj Rakontoj.

(6a milo.)



BERLIN.

Esperanto Verlag Möller & Borel

kaj korespondantoj en

Paris, London, Washington, Kjöbenhavn, Warszawa, Barcelona,
Budapest, Moskva, Genova, s'Gravenhage, Genève.

ESPERANTO - VERLAG
ELLERSIEK & BOREL G. M. B. H.
BERLIN KAJ DRESDEN

DU
GRAVAJ GAZETOJ

multe ŝatataj kaj tre legindaj
por ĉiu Esperantano, estas

**GERMANA
ESPERANTISTO**

Monata gazeto por la
dismvastigo de la lingvo
Esperanto, kaj

**ESPERANTO -
PRAKTIKO**

Monata gazeto por per-
fektigo en la Lingvo
Internacia

Ĉefredaktoro por ambaŭ
FRIEDRICH ELLERSIEK

Redaktoroj: Arnold Behrendt
kaj Karl Minor



Oni postulu specimenajn numerojn, kun-
sendante po unu nova respond-kupono

dkd. 2561

**ESPERANTA
BIBLIOTEKO INTERNACIA**

N-oj 10-11

Japanaj Rakontoj

Kunmetis
Ĉif Toŝio

Tria eldono
(7a—10a miloj)



1923

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Alle Rechte an den Übersetzungen vorbehalten.
Ĉiuj rajtoj rilate al la tradukoj estas rezervitaj.
Copyright 1923 by Ellersiek & Borel G. m. b. H.,
Berlin.



V-11189

Klariga Antaŭparolo

Tiu ĉi kajero enhavas Japanajn fabelojn kaj rakontojn de diversaj Japanaj tradukintoj. Ĉiuj tradukoj aperis en „Japana Esperantisto“ de 1907 ĝis 1909, sed la teksto de „Uraŝima“ estas parte ŝanĝita, kaj la aliaj ankaŭ zorge reviziitaj kaj korektitaj. La enhavo estas:

1. Taglibro, tradukita de Sh. Minakami.
2. Du Sake-Vendistoj, tradukita de J. Kimra.
3. Senlanga Pasero, esperantigita de Dro E. Asada.
4. Edziniĝo de Ratino, esperantigita de K. Kajiwara.
5. Spegulo de Matsujama, esperantigita de Ĉif Toŝio.
6. Gemo Alfluiga kaj Gemo Forfluiga, tradukita de K. Nohara.
7. Uraŝima, esperantigita de Ĉif Toŝio.

„Taglibro“ estas nuntempa prozaĵeto, verkita de Nakagawa, premiita kaj publikigita de la ĵurnalo *Y o r o z u C h o h o* en 1908. Ĝi ne estas modela ĉefverko, sed per ĝi oni povas ekvidi la nunan stilon de Japanaj prozaĵoj. „Du Sake-Vendistoj“ estas humoraĵo de Tokuchi Koodo,

tie ĉi konata, maljuna novelisto. „Senlanga Pasero“ kaj „Edziniĝo de Ratino“ ambaŭ estas tre popularaj fabeloj de l' moderna tempo. „Spegulo de Matsujama“ estas mezepoka familia rakonto, sed la esperanta traduko devenas de la nuntempa verko de Sazanami Sanjin.

La du ceteraj rakontoj estas ĉerpitaj el la plej malnova fonto de la Japana literaturo. Tamen unu diferencas de la alia per tio, ke „Uraŝima“ estas modernigita reproduktaĵo de la malnova legendo, dum „Gemo Alfluiga kaj Gemo Forfluiga“ estas rekta traduko de tiu antikva literaturaĵo.

La Uraŝima-legendo estas unu el la plej malnovaj kaj plej disvastigitaj popollegendoj de la nacio; ĝia unua priskribo sin trovas en Nihon Ŝoki, grava historia verko de Japanujo, skribita en la antikva Ĥina lingvo kaj aperinta en la jaro 719. Tango Futoki (Loka Kroniko de Tango Provinco), kiu aperis iom pli malfrue ol Nihon Ŝoki, enhavas kompletan kaj tre belstilan rakonton pri Uraŝima, kaj en Man-yo-ŝu, la plej malnova poeziaro, aperinta je la fino de l' oka jarcento, ankaŭ troviĝas poemo pri Uraŝima. Tiuj tri skribaĵoj estas la plej malnovaj kaj originalaj. De tiu tempo, en la daŭro de mil ducent jaroj la legendo disvolviĝis kaj disvastiĝis, ĝi aperis en diversaj formoj en romano, en dramo, en poezio, en popola kanto kaj en infana legaĵo.

„Gemo Alfluiga kaj Gemo Forfluiga“ estas elprenita el Nihon Ŝoki, kaj la sama legendo troviĝas ankaŭ en Kojiki, la plej malnova historio de Japanujo, verkita en la Japana lingvo per Ĥinaj literoj (ĉar tiam ankoraŭ ne ekzistis la Japanaj literoj „Kana“) kaj aperinta en jaro 711, t. e. 8 jarojn pli frue ol Nihon Ŝoki.

La legantoj vidos, ke inter tiuj ĉi du legendoj ekzistas multaj interesaj koincidoj; ekzemple: ambaŭokaze la ĉefpersono estis fiŝkaptisto, kaj li iris al la Mara Palaco per neordinaraj vojo kaj maniero. Ambaŭokaze en la Mara Palaco estis bela fraŭlino, tiu ĉi enamiĝis kun la vizitanto, ili kunvivadis iom da tempo, kaj poste la viro sopiris por sia hejmo kaj fine revenis hejmen. Ambaŭokaze la viro reveninta hejmen ĵurrompis kontraŭ la virino, kaj pro tio ilia ligiteco estis por ĉiam perdita.

Resume la du legendoj estas samformaj kaj samfamiliaj; ili apartenas al la mondvastigita mito, kiu rakontas pri edziĝo de homo kun dio (tie ĉi „dio“ signifas ian supernaturan aŭ nenaturan estaĵon), kaj similaj legendoj troviĝas multaj en preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo. Aliflanke tamen ni povas diri, ke tiuj du legendoj apartenas al la mito, kiu preparolas restadon de homo en dilando (ne postmorta). Legendoj de tiu ĉi kategorio ankaŭ estas dissemiitaj tra la mondo, sed precipe inter Ĥinaj

legendoj ni trovas plej multe da ekzemploj, ĉar pratempej Ĥinoj kiel ankaŭ Japanoj imagis sian mondon de feliĉo en la spaca ekzisto, anstataŭ ol sonĝi pri venonta paradizo aŭ postmorta regno de l' ĉielo. Tamen estas rimarkinde, ke la dilando de Japanoj ĉiam estis transmara insulo, dum tiu de Ĥinoj precipe estis en montarego.

Tokio, Oktobro 1909.

Ĉif Toŝio

Taglibro

De Nakagawa

Okamura forĵetas la plumon al muro.

Kion! Kion mi faras skribante tiajn malverojn! Kion do mi faras skribante malveran taglibron!

Se ĝi estus romano . . . sed, kiel utilas malvera taglibro? Kia estis la vetero aŭ kiu min vizitis, tio ne meritas mencion en mia historio. Tamen mi neniel povas skribi tion, kion mi vere sentis kaj vere ekpensis. Imagu, ke mi skribis tion, se miaj amikoj okaze ekieĝus tiun ĉi taglibron, mi pro honto plu ne kuraĝus revidi ilin. Krome, kiu povas certigi, ke ĝi ne estos alportata de ia hazardo en la manon de mia edzino? Se ŝi ekvidos miajn malkaŝitajn konfesojn, ho, kion ŝi diros? kion ŝi faros?

Mi, malsaĝulo? Ĉe mi la konscienco kaj la pasioj neniam akordiĝas. Mi komprenas, ke mi devas ion fari, sed mi tion ne povas plenumi. Mi bone konscias, ke ekpensinte tiajn malnoblajn aferojn mi estus malinda kiel homo, kaj ne povus vivi kiel edzo, sed mi ĉiam vokas al mi nedireble malnoblajn pensojn. Se

mi, ne trompante min mem, estus skribinta ĉion, kion mi sentis kaj pensis, mi eĉ ne povus morti kviete. Mi devus enŝlosi mian taglibron en feran koŝron kun duobla seruro, kaj mi ne malfermus ĝin, eĉ se oni min pendigus pro tio!

Se mi iam malvarmumetus, kaj fariĝus nur iomete febra, mia penso tuj alflugus al la taglibro, kiun mi kaŝis sekrete. Se tiu malvarmumo progresus malbone, fariĝus ĉu pneŭmonio ĉu alia danĝera malsano, kaj mi estus tuj mortanta... ne, mi ne suferus de febro pli ol de la taglibro, kiun mi lasos post mia morto; mi ja ne povus morti, se mi ne estus forbruliginta ĝin!

Nenia scienculo de neniu lando diras, ke la homo mortas nur post longa kuŝado sur lito de malsano. Jes, la morto ne distingas junan de maljuna; ĝia alveno ne atendas eliron de enspiro. Tiel pensante, pli kaj pli mi konfuziĝas pro la taglibro; ĉiun spiradon mi sentas ĉagrene, mi eĉ ne povas ĝui trankvilan, plenan spiradon.

Eble oni dirus:

Tion vi vere sentis, tion vi efektive pensis, kaj tion vi skribas tute honeste tiel, kiel vi sentis aŭ pensis, — sufiĉe, tre bone, tiel vi estas prava, ĉu ne? Ha, kion mi diros?

Jes, certe! mi nur povos diri. — Jes, ĝuste tiel! Nur se oni skribus honeste kaj senafekte ĉion, kion oni sentis kaj pensis, oni farus bonan

taglibron, kaj tiamaniere formiĝus indaj memorajoj.

Mi bone komprenas, sed mi neniam povas praktiki. Ho, kia kompatinda besto! Ido de l' peko!

Kio okazis al mi hodiaŭ en tramĉaro, kiam mi estis revenanta de Kanda strato? Kion mi pensis pri la fraŭlino, kiu tiam kunveturis en la ĉaro? Mi pensis:

Ha, belulino! Tiu ĉi fraŭlino estas efektive bela. Kvankam la nazo estas iom kritikebla, — mi ne estu tro postulema, — certe, multe pli bela ol mia edzino. Se mi povus edziĝi kun tiu ĉi fraŭlino, mi estus tre feliĉa, mi estus kontenta, eĉ se oni malmultigus mian salajron ĝis duono.

Kies filino do? Kie ŝi loĝas? Mi eksciuj ŝian domon, por ke mi povu fianĉiĝi kun ŝi, kiam mia edzino estos mortinta.

Serco? Ne, tute ne! Mi serioze tiel pensis; tiam en mia koro plu ne ekzistis la edzino, la mondo, moralo, prudento, ĉio; mi nur rigardadis tute ensorĉite tiun fraŭlinon kaj prisonĝis la ĝojajn tagojn de edziĝo. Dume, neatendite, ĉe la haltejo de Iidabashi la fraŭlino eliris.

Mia malsaĝeco estas senmezure granda! Mi tiel malĝojis, ke mi preskaŭ ekploris, kaj forgesante la vidon de la publiko, mi elmetis la kapon el la fenestro, sekvis ŝin per okuloj

rigardegantaj, kaj deziris, ke ŝi donu unu rigardeton al mi.

Ĉu tion mi povas enskribi en mian taglibron? Sed efektive, hodiaŭ neniam afero estis pli grava ol tio, nenion mi pensis pli serioze ol tion. Kaj mi tion ne skribas! Kia senutila taglibro! Kion mi faras per tia malvera taglibro!

Tamen, kiel mi kuraĝus noti tian ridindan aferon? Kion dirus miaj amikoj, se ili vidus ĝin? Antaŭ ĉio, kio okazus, se mia edzino tion eklegus? — Tiam, nur morti mi povus!

Kial? — Mi estas nepardonebla pekulo, mi ofendis virgulinon, mi edzo faris adulton, eĉ mortigis la edzinon, ĉu ne?

Malsaĝegulo de tridek-du jaroj!

Kian malnoblan ideon mi portas! Kiel hontindan penson mi vokas al mi! Mi, malestiminda, riproĉinda, pendiginda pekulo!

Mia patro estis sufiĉe diboĉema, diris mia patrino. Sed mi, multe pli... mi eĉ adultas tre ofte, almenaŭ en koro.

Malforta, frivolanima sentaŭgulo! Mi abomenas min mem. Neniel la konscienco kaj la pasio unuigas ĉe mi. Kontroli pasion mi tute ne povas. Kial?

Okamura ekstrema kaj la okulojn fiksas al la muro.

Lia vizaĝo paliĝas, liaj lipoj tremas. Kvazaŭ akvo trafluas sur la dorso, li sentas malvarmon.

Tri - kvin - sep minutoj pasas. Okamura senmove sidas kun la okuloj fikse rigardantaj. Subite, kvazaŭ mortinto malfermas la okulojn, li ekkrias — um!

Li prenas novan plumon el la kesteto, sed nur tenante ĝin en la mano li ree rigardegas la muron.

Tri - kvin - sep minutojn!

Okamura sidas senmove.

Tradukis Sh. Minakami

(El „Japana Esperantisto“, N-o 4, 1909.)

Du Sake*)-Vendistoj

De Tokuchi Kodo

He! Haĉiko, ĉu vi estas hejme?

Ĉu vi? Amiko Kumako! Eniru!

Kia bela printempa vetero!

Jes, belega.

Multaj homoj iradas admiri la ĉerizflorojn:
Kial vi restadas hejme en tia sezono?

Ve! Mi iom hontas diri al vi, mia kunfrato,
ke mi ne havas eĉ unu senon**). Kaj kun
senenhava monujo nenie troviĝas plezuro; mi
do restadas hejme fumante kiel tekruĉo!

Ne, tio estas sensencaĵo! Ni kuniru admiri
la ĉerizflorojn en Mukoĵima.

Kiel mi diris al vi, mi ne povas eliri...

Sed, post 4 aŭ 5 tagoj, ne restos plu floroj!

Mi tion bone scias. Sed ve!...

Mia poŝo ankaŭ estas malplena kiel la via.
Sed post longa medito, mi fine elpensis bonegan
metodon gajni monon admirante la florojn.

Ho, ho! Kaj kiel?

*) Saké (vino) estas la plej komuna ebriiga trinkaĵo
de Japanoj, farita el rizo.

***) Japana mono.

Pro tio mi venis vin voki. Ĉu vi ne venos kun mi? La afero postulas du homojn.

Jes, jes, tre volonte! Kaj kia estas mia rolo?

Ĝi estas tre simpla! Mi petis Sake-vendejestron pruntedoni unu bareleton da Sake. Ni alportu ĝin al Mukojima kaj vendu ĉiun glason po dek senoj.

Bonega ideo! Jes, des pli Sake malmultiĝas, ju pli da Sake-amantoj volas ĝin havi; kaj ili aĉetos eĉ po dek senoj.

Mi kunportis unu moneron de dek senoj por la okazo, ke oni pagos al ni per monero de dudek senoj.

Ha, mia amiko, vi estas multe pli saĝa kaj pli riĉa ol mi, ĉar mi ne havas eĉ dek senojn!...

Nu, ni iru!

Jes, jam multaj gajuloj kantas kaj dancas sub la floraro; al ili jam Sake mankas. Ni iru kiel eble plej baldaŭ!

Ni multe gajnos kaj poste, reveninte hejmen, ni drinkegos ĝis sateco.

Jes, post laboro ridetas ĝojo. Nun mi estas tute preta. Ni do ekiru!

Vi iru antaŭe.

La du amikoj, ambaŭ drinkemuloj, iris al Mukojima, portante la barelon sur siaj ŝultroj per bastono.

H a ĉ i k o. Vidu Kumako! Kia amaso da homoj! Kiel gajaj estas tiuj ebruloj! Vere la gusto de Sake estas nekomprenebla por tiuj, kiuj ne amas ĝin, ĉu ne?

K u m a k o. Ĉesu, ĉesu diri tian kruelaĵon!

H. Kruelaĵo? Kial?

K. Ĉar vi vekas infanon pace dormantan.

H. Klarigu, mi tute ne komprenas vian diron.

K. Por vi, kiu marŝas antaŭ mi, estas nenio; sed por mi, kiu sekvas la barelon, — bonegaodoro de Sake alvenas kaj eniras ĝis la fundo de mia elsekigita ventro...

H. Ha, vere mi ne pensis pri tio, senkulpigu min!

K. Aa! Mi eksentas min malsana... Kion vi diros, mia kunfrato, pri tio, se...

H. Kion vi deziras?

K. Nia Sake estas vendaĵo, do ne estas prave trinki ĝin senpage! Sed se mi pagos dek senojn por glaso... estos nenia malpraveco pro tio, ĉu ne estas vere?

H. Jes, prave.

K. Se jes, mi volus trinki unu glason por trankviligi mian malsaneton.

H. Nia Sake estas vendaĵo; do vendi al tiu aŭ alia homo estas tute same. Ĉiu estas kliento!

K. Do, jen dek senoj, prenu la monon kaj donu al mi unu glason!

H. Vi estas bonvenanta, sinjoro! Mia Sake estas de la plej bona kvalito.

K. (trinkante). Ho, jes, vi estas prava! Estas bonege! Kia bonguŝto!... Nun mi estas tute resanigita; ni do ekiru! (Ili ekmarŝas.) Aa, mi sentas min tre gaja! La gusto de Sake estas ĉiam nedirebla!... He! amiko, kiel vi estas? Ĉu vi estas iom malsana?

H. Se vi trinkis kaŝe...

K. Kaŝe? Kial?

H. Enverŝinte Sake-n por vi kaj vidante vin eltrinkantan, mi fariĝis iom malgaja... Nia Sake estas vendaĵo. Do, kion vi dirus, se mi pagos dek senojn por glaso? Tiel mi estos kliento kiel iu alia, ĉu ne estas vere? Se mi ne trinkus iom, mi ekfariĝos freneza!

K. Bone, bone! Komercisto vendas al kiu ajn. Nur pagu dek senojn kaj vi ĝin havos.

H. Jen estas (pagas al K. kaj trinkas)! Ha, ha, bonege! Kia gusto! Via Sake estas de la unua kvalito.

K. Jes, sinjoro. Mi petas vian estontan favoron.

H. Ha, ha! Vi fariĝis bona vendisto. Nu ekiru!

K. (post kelktempo). Haltu, mi petas.

H. Kion vi diras?

K. Pli bone estus, se mi estus nenion trinkinta.

H. Kial do?

K. Ĉar mi trinkis nur unu glason, kaj nun mi sentas min pli soifa, pli malsana ol antaŭe. ... mi ne povas plu kunporti la barelon kun vi, amiko mia!

H. Tio estas malkonvena. Se ni ne alvenos ĝis Mukojima, ni ne povos gajni tion, por kio ni drinkados tiun ĉi nokton. Resaniĝu, mi petas. Ĉu vi volas, ke ni ripozu iom?

K. Ne, ne, ni ne perdu tempon ĉi tie. Amiko, vendu al mi ankoraŭ unu glason kaj mi tuj resaniĝos... mi fariĝos kapabla kunporti nian barelon.

H. Se la Sake estas tiel efika por via resaniĝo, prenu ĝin.

K. Jen estas dek senoj! Plenigu la glason ĝis la bordo (trinkas)! Nun mi estas sanega, fortega! Ni iru antaŭ ol la popolamaso disiros.

(Ambaŭ vendistoj marŝas apenaŭ cent metrojn.)

H. Haltu!

K. Kio okazas?

H. Vi marŝas tro rapide, kaj mi havas ventrodoloron. Mi trinkis nesufiĉan kvanton da Sake, kaj mi pensas, ke mia stomako parte malsekiĝis, sed parte restis ankoraŭ tute seka, kaj pro tio mi havas ventrodoloron... Jen dek senoj! donu al mi por trinki.

H. Tre volonte!

Tiamaniere, niaj ambaŭ vendistoj trinkadis unu post la alia, ĝis kiam ili alvenis Mukojima-n.

La barelo fariĝis tre malpeza, kaj ili tute ebriaj.

H. He! Gesinjoroj, pardonu!... Kunulo, kie ni malfermos nian butikon?

K. Tie ĉi sub la belega floraro! Ĉiuj trovos nian butikon kaj alvenos amase.

Ambaŭ ebruloj sidiĝas sub ĉerizarbo kaj kriadas laŭte. Sinjoro, jam sufiĉe ruĝa, alvenas por replenigi sian eltrinkitan botelon.

K. Ho! Sinjoro, vi estas bonvenanta! Nia Sake estas tre bongusta.

Kunulo, mezuru la Sake-n pli rapide kaj plenigu la botelon al tiu ĉi sinjoro... Pli klinigu la barelon... Kion vi faras?

H. Ho ve, amiko! Ni jam vendis la tuton, plu ne restis eĉ guteto.

K. Sinjoro, ni tre bedaŭras, ke ni ne havas plu da Sake; ĝi estas jam elvendita.

La sinjoro foriras.

H. Nun, nia afero iris pli rapide kaj sukcese ol ni antaŭe supozis! Ni do kalkulu la tutan sumon, kiun ni gajnis.

K. Jes bone, jen vi vidas!

Li renversas sian monujon, nur unu monero de dek senoj elfalas.

H. Tio estas stranga! Serĉu ankoraŭ. Nia vendaĵo estas tute elvendita kaj ni ne havas pli ol dek senojn!

K. Jes, mi komprenas, nenio stranga!

H. Nenio stranga?

K. Pripensu bone. La unuan fojon mi aĉetis la Sake-n pagante al vi dek senojn, due vi pagis, trie mi k. t. p. ĉiam donante kaj redonante tiun saman moneron inter ni reciproke, kaj dume la tuta Sake estis eltrinkata!

H. Ha, ho jes! mi komprenas! Ni nur ne povis multe gajni, sed ni ankaŭ neniom perdis, ĉar ni havas ja la moneron de dek senoj!!

Tradukis J. Kimra

(El „Japana Esperantisto“, N-oj 5, 6, 1908.)

Senlanga Pasero

Antaŭ nekalkuleblaj jaroj vivis maljunulo kun sia edzino. La maljunulo, kiu havis bonegan koron, havis junan paseron, kiun li nutradis tre ameme. Sed lia edzino estis malafabla kaj kruela maljunulino, kaj unu tagon, kiam la pasero estis manĝinta iom da pasto, per kiu ŝi estis amelonta sian tolaĵon, ŝi estis tiel kolera, ke ŝi fortranĉis la langon de la pasero kaj elpelis la birdeton. Kiam la maljunulo revenis de la montetoj kaj trovis, ke la birdo estis forfluginta, li demandis, kie ĝi estas; la maljunulino respondis, ke ŝi fortranĉis ĝian langon kaj ĝin elpelis, ĉar ĝi estis ŝtelinta ŝian amelpaston. Aŭdinte tiun ĉi kruelan rakonton, la maljunulo malĝojis treege kaj pensis en sia koro: „Ho ve! kien mia birdeto iris? Kompatinda birdeto! Kompatinda malgranda senlanga pasero! Kie estas via nuna hejmo?“ Kaj li vagis de loko al loko serĉante sian dorlotiton kaj kriante: „Kie estas la senlanga pasero?“

Unu tagon, ĉe la piedo de ia monto, la maljunulo renkontis la perditan birdon; kaj kiam ili estis gratulintaj unu la alian pro bonfarto, la pasero kondukis la maljunulon al sia hejmo kaj prezentis lin al sia edzino kaj paseridoj,

metis antaŭ li ĉiujn specojn de frandaĵoj kaj regalas lin tre gastame. Fine, la maljunulo diris, ke li devas iri hejmen; kaj la birdo, prezentante al li du salikajn korbojn, petis lin, ke li kunportu ilin kiel disiĝdonacon. Unu el la korboj estis peza kaj la alia estis malpeza; tial la maljunulo dirante, ke, ĉar li estas maljuna kaj malforta, li volas nur akcepti la malpezan korbon, metis ĝin sur sian ŝultron kaj foriris, lasante la paserfamilion ĉagrenanta pro lia foriro.

Kiam la maljunulo alvenis hejmen, la virino tre kolere komencis riproĉegi lin, dirante: „Nu, kie vi estis tiujn ĉi multajn tagojn? Beleta afero ja, vagi en via aĝo!“ „Ho! li respondis, mi vizitis la paseron; kaj kiam mi foriris, ĝi donis al mi tiun ĉi salikan korbon kiel disiĝdonacon.“ Tiam la geedzoj malfermis la korbon por vidi, kion ĝi enhavas. Jen estis la korbo plena de oro kaj arĝento kaj aliaj multekostaj objektoj! Kiam la maljunulino, kiu estis tiel avida kiel malfabla, vidis la tutan riĉaĵon etenditan antaŭ ŝi, tuj ŝi ŝanĝis sian riproĉegantan manieron kaj ne povis kontroli sian ĝojon. „Mi ankaŭ iros kaj vizitos la paseron,“ ŝi diris, „kaj ricevos beletan donacon.“

Ŝi demandis la edzon pri la vojo al la domo de la pasero kaj ekiris por sia vojaĝo. Fine ŝi renkontis la senlangan paseron, kaj ekkriis: — „Bonrenkontita! bonrenkontita! Sinjoro

Pasero! Mi longe atendis havi la plezuron vin vidi.“ Tiamaniere ŝi penis flati kaj delogi la paseron per dolĉaj paroloj. La birdo estis devigata inviti la maljunulinon al sia hejmo; sed ĝi ne regalis ŝin kaj diris nenion pri disiĝdonaco. Ŝi tamen demandis pro io por kunpreni kun si kiel memoraĵon de sia vizito. Tial la pasero prezentis du korbojn, kiel antaŭe, kaj la avida maljunulino, elektinte la pli pezan el ili, forportis ĝin kun si. Sed kiam ŝi malfermis la korbon, ĉiaj specoj de koboldoj kaj feinoj elsaltis el ĝi kaj komencis turmenti ŝin.

Sed la maljunulo adoptis filon, kaj lia familio fariĝis riĉa kaj prospera. Kia feliĉa maljunulo!

Tradukis D r o E. A s a d a

(El „Japana Esperantisto“, N-o 4, 1907.)

Edziniĝo de Ratino

Maljuna rato havis filinon. Ĝi volis edziniĝi tiun ĉi kun iu plej forta en la mondo. Ĝi unue iris al la luno, pensante, ke la luno estas la plej forta en la mondo. Sed la luno diris: „Min tre ofte malhelpas la nubo, kaj mi neniel povas forpeli ĝin.“

Ĝi tiam iris sin turnis al la nubo, pensante, ke la nubo estas pli forta ol la luno. Sed la nubo diris: „Min ĉiam dispelas la vento, kaj mi neniam povas al ĝi kontraŭstari.“

Trie ĝi iris al la vento, pensante, ke la vento estas pli forta ol la nubo. Sed la vento diris: „La muro staras kontraŭ mi, kaj mi tute ne povas trapasi ĝin.“

Fine ĝi iris al la muro, pensante, ke la muro estas pli forta ol la vento. Sed la muro ankaŭ diris: „Via familio ĉiam min mordadas, kaj mi ne povas tion haltigi.“

Jen ĝi komprenis, ke ratino nur devas edziniĝi kun rato, kaj reveninte hejmen, ĝi edziniĝis sian filinon kun juna rato de sia najbareco.

Tradukis K. K a j i w a r a

Spegulo de Matsujama

La Familia Rakonto de Mezepoka Japanujo

Antaŭ tre longe en malnova Japanujo vivis en vilaĝo Matsujama de Echigo, tre malproksima provinco, geedzoj, kiuj jam de kelkaj jaroj kunvivadis kaj estis benitaj per beleta filineto. Tiu ĉi estis la ĝojo kaj fiero de iliaj vivoj, kaj en ŝi ili trovis senfinan fonton de feliĉo por sia maljuna aĝo.

Plej feliĉaj tagoj en ilia memoro estis tiuj, kiuj signis ŝian kreskadon de infaneco; la vizito al la templo*) post cent tagoj de ŝia naskiĝo, kiam la fieranta patrino kunportis ŝin, vestitan per ceremonia kimono, por esti metata sub la patronecon de la familia dio; jen ŝia unua pupofesteno**), kiam la gepatroj donis al ŝi aron da belaj pupoj kaj iliajn malgrandajn apartenaĵojn; kaj la plej memorinda okazo el ĉiuj, en ŝia kvina naskotago, kiam ŝia unua obi (largâ zonrubando) el skarlata orŝtofo estis ligata ĉirkaŭ ŝia talieto, kio signifas ke ŝi transpasis

*) Ĝuste la centan tagon post la naskiĝo infanoj vizitas la templon de sia familia dio.

**) Ĉiujara familia festeno por knabinoj je la 3a de Marto.

la eniran sojlon de knabineco. Nun ŝi estas sepjara kaj parolas kaj servas al la gepatroj en ĉiuj tiuj beletaj manieroj, tiel karaj al amantaj gepatroj; al ilia feliĉeco ja nenio mankas, ĝi estas kiel aŭtuna plenluno.

Unu tagon ekscitaĵo okazis en la familio pro tio, ke la patro estis subite alvokita al la ĉefurbo pro siaj aferoj. En nunaj tagoj de fervojoj kaj vaporŝipoj oni nur malfacile imagas, kion signifis tiam vojaĝo de Matsujama al Kioto. La vojoj estis malbonaj, kaj ordinara popolo devis vojiri per siaj propraj piedoj, ĉu cent mejlojn, ĉu mil mejlojn. Ja en tiuj tagoj iri al la ĉefurbo estis tiel granda entrepreno kiel nun vojaĝi al Eŭropo de Japanujo.

La edzino estis tre maltrankvila, dum ŝi helpis la edzon en preparado por la longa vojaĝo, pensante kian malfacilan taskon li havas. Vane ŝi deziris, ke ŝi povu akompani lin, sed la malproksimeco estis tro granda por la patrino kaj la filino, kaj krom tio estis la devo de edzino, zorgi pri la hejmo.

Ĉio estis preta fine, kaj la edzo staris ĉe la vestiblo kun sia malgranda familio.

„Estu trankvila, baldaŭ mi revenos,“ li diris. „Dum mi forestos, zorgu pri ĉio, speciale pri nia infaneto.“

„Jes, ĉe ni ĉio estos bona — sed vi — vi devas zorgi pri vi mem kaj ne malfrui unu

tagon en reveno," diris la edzino kun larmoj falantaj.

La filineto sole estis ridetanta, ĉar ŝi ne konis la malĝojon de disiĝo, kaj ankaŭ ne sciis, ke vojaĝo al la ĉefurbo estas tute malsama al vizito en la vilaĝo proksima, kiun la patro tre ofte faras. Ŝi kuretis al li kaj prenis lian manikon por reteni lin momenton.

„Paĉjo, mi estos tre ĝentila, dum mi atendas vin revenantan; mi do petas, alportu al mi donacon.“

Kiam la patro turniĝis, por havi la lastan rigardon al la ploranta edzino kaj al la ridetanta, havema filineto, li sentis kvazaŭ iu lin retiras per la haroj, kaj tial estis malfacile por li forlasi ilin, ĉar ili neniam disiĝis unu de la alia. Sed li sciis, ke li devas iri, ĉar la alvoko estis ordona. Per granda peno li ĉesis pensi, kaj decide turniĝante li rapidis tra la malgranda ĝardeno kaj eksteren de la pordego. La edzino, portante la filineton en siaj brakoj, kuris al la pordego kaj rigardadis lin, kiam li iris sur la vojo inter la pinarboj, ĝis kiam li tute malaperis en la nebuleto malproksima.

„Nun paĉjo estas foririnta, ni ambaŭ devas esti zorgemaj pri ĉio ĝis paĉjo revenos," diris la patrino, kiam ŝi eniris en la domon.

„Jes, mi estos tre ĝentila," diris la knabino, farante kapsignojn, „kaj kiam paĉjo revenos,

diru al li, ke mi estis tre ĝentila, kaj tiam eble li faros al mi donacon.“

„Paĉjo certe alportos al vi ion, kion vi tre deziras havi. Mi estas certa, ĉar mi petis lin, ke li havigu al vi pupon. Vi devas pensi pri paĉjo ĉiutage, kaj preĝi pro lia bona vojaĝado.“

„Ho, jes, kiam paĉjo estos reveninta hejmen, kiel feliĉa mi estos,“ diris la knabino, interfrapante la manojn, kaj ŝia vizaĝo heliĝis kun ĝoja penso. Ŝajnis al la patrino, kiam ŝi rigardis la vizaĝon de la filineto, ke ŝia amo al ŝi fariĝas pli kaj pli profunda.

Tiam ŝi komencis laboradon por prepari la vintrajn vestaĵojn de la familio. Ŝi ŝpinadis fadenon per radŝpinilo, antaŭ ol ŝi teksadis la ŝtofojn. Dum sia laborado ŝi gvidis la ludadojn de sia filineto kaj instruis ŝin legi malnovajn rakontojn de sia provinco. Tiamaniere la edzino trovis konsolon dum la solecaj tagoj de la forestado de sia edzo. Dum la tempo tiel pasis rapide en la kvietaj hejmo, la edzo finis siajn aferojn kaj revenis.

Ne estus rekoninta lin iu, kiu antaŭe ne konis lin tre bone. Li vojiradis tagon post tago, elmetadis sin al ĉiuj veteroj dum tuta monato, kaj estis brunigita bronzkoloro, sed liaj amataj edzino kaj filineto lin konis tuj ekrigardante; ili alkuris renkonti lin de ambaŭ

flankoj, kaj ĉiu prenis unu el liaj manikoj dum ilia varma salutado. Ambaŭ la edzo kaj edzino ĝojegis revidi unu la alian bonstatan. Ŝajnis tre longa tempo al ili ĉiuj, ĝis liaj pajlosandaloj estis malligitaj; lia larĝa ombrel-ĉapelo estis forigita per helpo de la edzino kaj filineto, kaj li sidiĝis ree inter la familio en sia malnova ĉambro, de kiu li forestis tiel longe.

Tuj kiam ili sidiĝis, la patro malfermis bambuan korbon, kiun li alportis kun si, kaj elprenis belan pupon kaj lakitan skatoleton plenan de kukoj, kaj diris al la filineto:

„Jen, donaco por vi! Ĝi estas rekompenco pro via bona zorgado pri panjo kaj pri la hejmo dum mia forestado.“

„Dankon, paĉjo!“ diris la knabino, farante riverencon, kaj elmetis siajn manojn kun streĉitaj fingretoj por ricevi la pupon kaj la skatoleton, kiuj ambaŭ, venintaj el la ĉefurbo, estis pli belaj ol ĉio, kion ŝi vidis antaŭe. Neniaj vortoj povas esprimi, kiel ĝojis la knabineto — ŝia vizaĝo ŝajnis kvazaŭ fandiĝi pro ĝojo, kaj ŝi ne havis okulojn nek penson pri io alia.

Ree la edzo serĉis en la korbo, kaj elprenis tiun ĉi fojon kvadratan skatoleton el ligno, zorge ligitan per ruĝa kaj blanka fadeno, kaj metante ĝin en la manon de la edzino, li diris:

„Jen, tio ĉi estas por vi!“

La edzino zorge malfermis la kesteton kaj elprenis el ĝi rondon metalplaton kun tenilo alligita. Unu flanko de la plato estis tiel glata kaj brila kiel kristalo, kaj la alia flanko surhavis reliefajn figurojn de pinarboj kaj grupoj. Neniam ŝi vidis tian objekton, ĉar ŝi estis naskita kaj edukita nur en tiu malproksima provinco de Echigo. Kiam ŝi ekrigardis al ĝia hela supraĵo, ŝi diris kun mirego:

„Ho, strange! Iu sinjorino min rigardas el tiu ĉi ronda objekto! Kio do estas ĝi?“

Ridante la edzo diris:

„Tio, kion vi vidas, estas via propra vizaĝo. Ĝi estas nomata spegulo, kaj rigardante ĝian supraĵon, oni vidas sian vizaĝon tie rebrilantan. Kvankam en tiu ĉi vilaĝo oni akoraŭ ne konas la spegulojn, ili estas uzataj en la ĉefurbo jam de la plej antikva tempo. La spegulo estas konsiderata kiel grava necesajo por virino. Tiel proverbo diras, „la glavo por la samurai (kavaliro) kaj la spegulo por la virino“, kaj laŭ la popola tradicio, la spegulo de virino estas la montrilo de ŝia koro — se ŝi tenas ĝin ĉian klara, tiam ŝia koro estas pura kaj bona. Ĝi estas ankaŭ unu el la tri sanktaj trezoroj de la Mikada familio. Vi do devas ĝin konservi tre atente, kaj uzi kun granda zorgo.“

La edzino aŭdis lian tutan rakonton kaj estis tre feliĉa lerni tiel multon, kio estis nova

al ŝi. Ŝi estis ankaŭ tre danka pro tiu altvalora donaco de sia edzo.

„Se la spegulo reprezentas mian koron, mi certe ĝin estimos kiel altvaloran posedaĵon, kaj neniam uzos ĝin malzorgeme.“ Kaj ŝi remetis ĝin en la kesteton kaj tenis en sia kofro. La edzino, vidante ke ŝia edzo estas tre laca, iris prepari vespermanĝon, kaj servis al li kun ĉiu komfortigo, kiun ŝi povis prezenti. Ŝajnis al la familio, kvazaŭ ili ne konis veran feliĉon antaŭe, tiel ĝojaj estis ili, revidante unu la alian en tia bonfarto. Tiun ĉi vesperon la edzo multe parolis pri sia vojaĝo kaj pri ĉio, kion li vidis en la granda ĉefurbo.

Forpasis la tempo ĉe la paca familio, kaj la gepatroj vidis, ke iliaj plej fervoraj esperoj estis realigataj, kiam ilia filineto fariĝis bela knabino deksejara. Kiel juvelo senkompare karega estas tenata en la mano de sia fieranta posedanto, tiel ili ŝin elnutris kaj edukadis kun senĉesaj amo kaj zorgo; nun iliaj penoj estis pli ol duoble rekompencitaj. Kia helpo ŝi estis al la patrino, kiam ŝi ĉirkaŭiradis en la domo por plenumi sian parton de la mastrumado, kaj kiel kontenta la patro estis, kiam ŝi ĉiutage memorigis al li la patrinon en ŝiaj unuaj edzecaj tagoj.

Sed, ho ve! en tiu ĉi mondo nenio restas senfine bona. Al la luno malhelpas nuboj, floroj

disfalas pro vento. La feliĉo de tiu ĉi familio fine estis rompita per granda malĝojo. La bona patrino, ĝentila edzino fariĝis malsana.

En la komenco de ŝia malsaneco la patrino kaj filino pensis, ke ĝi estas simpla malvarmumo. Sed la tagoj pasis kaj la patrino neniam resaniĝis. La kuracisto estis embarasita kaj spite de ĉio, kion li provis, la malsanulino ĉiutage fariĝis pli kaj pli malforta. La patrino kaj filino estis frapataj de timo, kaj tage kaj nokte la knabino neniam foriris de apud la patrino. Tamen la vivo de la malsanulino ŝajnis tute senespera.

Unu tagon, kiam la filino sidis apud la patrino kiel kutime, tiu ĉi leviĝetis sur la kuseno, kaj prenante ŝian manon rigardis serioze kaj ame en ŝiajn okulojn. La spirado de la malsanulino estis pena, kaj ŝi parolis kun maltrankvilo:

„Filineto mia, mi certiĝis, ke jam nenio povas min savi. Kiam mi estos mortinta, estu fidela zorgantino al via kara patro kaj estu ĉiam bona, ĝentila virino!“

„Ho, patrino,“ diris la knabino kun larmoj elfluantaj, „ne parolu tiajn aferojn. Ĉio, kio mi vi devas pripensi, estas rapida resaniĝo, kio mi alportos grandan feliĉon al la patro kaj al mi.“

„Jes, mi komprenas. Estas konsolo al mi en miaj finiĝantaj tagoj, ke mi scias, kiel multe vi deziras al mi resaniĝon, sed tio estas neebla. Ne tro malĝoju, ĉar tio estas difinita de l' sorto, ke mi mortu ĝuste en tiu ĉi tempo; mi tute submetiĝas al la destino. Nun mi havas donacon por vi, per kiu vi rememoros min, kiam mi estos foririnta en la vojaĝon, de kiu oni neniam revenas.“

Elmetante la manon, ŝi prenis de la flanko de sia kuseno lignan kesteton ĉirkaŭligitan per silkaj ŝnuroj. Ŝi malfermis ĝin tre zorge, kaj elprenis el ĝi la spegulon, kiun ŝia edzo donacis al ŝi antaŭ kelkaj jaroj.

„Kiam vi estis ankoraŭ infaneto, via patro vizitis la ĉefurbon kaj alportis hejmen por mi tiun ĉi trezoron; ĝi estas nomita spegulo. Tiun ĉi mi donas al vi antaŭ ol mi mortos. Se poste iam vi sentos vin soleca kaj sopiros pri mi, tiam rigardu tiun ĉi spegulon, kaj sur ĝia hela supraĵo vi ĉiam vidos min, tiel ke vi povos rakonti al mi ĉiujn viajn pensojn. Kvankam tiam mi ne parolos, mi bone komprenos vin kaj estos ĉiam simpatia al vi, kio ajn okazos al vi en estonta tempo.“ Kun tiuj ĉi vortoj la mortanta patrino enmanigis la spegulon al la filino.

La koro de la bona patrino ŝajnis nun trankvila, kaj en tiu tago, sen ia alia vorto, ŝia animo kviete forlasis la korpon.

La senigitaj patro kaj filino estis rompitaĵoj de malĝojo, kaj sin lasis al siaj maldolĉaj ploroj. Tamen la sekvantan tagon, kiam la furioza eksplodo de malĝojo kvietiĝis kaj la propra spirito revenis al ili, ili faris tre koran servon de funebro kaj plorante sekvis ŝian ĉerkon ĝis la tombejo.

La vivado de tiam ŝajnis dezerta al la filino. Ŝia amo al la mortinta patrino ne malkreskis dum la tempo, kaj tiel viva estis ŝia memoro, ke ĉio en la ĉiutaga vivo, eĉ ekfalo de pluvo aŭ ekblovo de vento, revokis al ŝia koro la morton de la patrino kaj ĉion pri tiuj tagoj, kiujn ili kune travivis.

Unu tagon, kiam la patro forestis kaj la knabino estis sola okupanta sin per mastruma laboro, ŝia soleca sento kaj malĝojo fariĝis por ŝi netolerebla. Ŝi ĵetis sin planken en la ĉambro de sia mortinta patrino kaj ploregis ĝis ŝia koro rompiĝis. Ŝi sopiris je unu videto al la amita vizaĝo, unu sono de la voĉo ŝin vokanta, aŭ momenta forgeso de la doloro en ŝia koro. Subite ŝi stariĝis. La lastaj vortoj de la patrino eksonis tra ŝia memoro, kiu ĝis nun estis malklarigita de la troa malĝojo.

„Ho! kiam ŝi donis al mi la spegulon, ŝi diris, ke kiam ajn mi rigardos ĝin, mi estos kapabla ŝin vidi. Mi preskaŭ forgesis tion — kiom malsprita mi estis!“

La knabino forviŝis la larmojn de siaj vangoj kaj prenis el la ŝranko la keston, kiu enhavis la spegulon. Ŝia koro batis kun espero, kiam ŝi levis la spegulon kaj rigardis ĝian glatan supraĵon. Jen, la patrino ŝin ne trompis! En tiu ronda metalo antaŭ si la vizaĝon de l' patrino klare ŝi vidas; sed, ho, ĝoja surprizo! Ĝi ne estis la patrino malgrasa kaj kaduka de malsano, sed juna kaj bela virineto tia, kia ŝi memoras la patrinon el la tagoj, kiam ŝi mem estis eta infano. La vizaĝo en la spegulo ŝajnis kvazaŭ ekparoli, tiel avide ĝiaj okuloj rigardis en la ŝiajn.

„Certe, tio ĉi estas la animo de l' patrino. Ŝi scias, kiel mizera mi estas sen patrino, kaj tiel venis konsoli min. Kiam ajn mi deziros ŝin vidi, ŝi venos tien ĉi renkonte; ho, kiel danko al ŝi mi devas esti!“

De tiam la premanta malĝojo multe malpeziĝis en ŝia koro. Ĉiun matenon por sin kuraĝigi je siaj tagaj devoj, kaj ĉiun nokton por sin konsoli antaŭ ol ŝi eniris en kuŝejon, la juna knabino elprenis la spegulon kaj multfoje rigardis la vizaĝon, kiun ŝi kredis la animo de l' patrino. Tagon post tago ŝi alsimiliĝis al la karaktero de la mortinta patrino; tiel ŝi estis ĝentila kaj bona al ĉiuj, kaj servema filino al la patro.

Unu jaro tiel forpasis en funebro ĉe la malgranda familio, kiam la patro, laŭ la konsilo

tenas al la sekvantaro de miaj Gracioj?“ „Mi ne scias, estrino“ — respondis la parolavida birdo — „ŝajnas, ke li ekamis morteman knabinon — se mi bone memoras, ŝi nomiĝas Psiĥe.“ Aŭdinte tion, komencis Venuso krei per sia tuta forto, ne haltigante jam sian indignon: „Se li ekamis Psiĥen, mian rivalinon je la beleco, ŝin, kiu mian nomon al si alproprigis, tiam verdire la filo faras el mi kuplistinon, ĉar mi faciligis al li la taskon ekkoni tiun mizerulinon.“

Tiel kriante, ŝi rapide superakviĝis el la maro kaj ekiris al sia ora ĉambrego. Trovinte en ĝi tiel, kiel ŝi aŭdis, la malsanan filon, jam de la pordo ŝi komencis krei: „Ĉu tio konvenas al via nobeleco? Kial vi kuraĝis piedbati la ordonon de via naskintino kaj eĉ estrino? Kial vi ne hezitis per abomena amo persekuti mian rivalinon, kaj estante ankoraŭ juna, nematura knabo, jam ŝin voluptame ĉirkaŭpreni? Do mi devas permesi, ke mia malamikino estu mia bofilino? Ĝoju nur, koketulo, delogisto, fripono, ke vi estas mia sola filo kaj ke mi pro mia iom tro malfrua aĝo jam ne havos infanojn. Vi vidus, ke mi naskus filon, multe pli bonan ol vi. Aŭ ne — por vin ankoraŭ pli dolore humiligi, mi kiel filon adoptos iun el miaj sklavoj, al li mi donos la flugilojn, torĉon, pafarkon, sagojn kaj entute la kompletan armilaron, kiun mi iam al vi enmanigis, sed ne por tia uzado. La virtoj de la patro tute ne influis vian karakteron. Vi estas sentaŭgulo de l' unua juneco, kaj vi

havas danĝerajn manojn; pli maljunajn personojn, al kiuj ni devas obei, vi ofte ofendas; eĉ al la patrino mem, al mi, vi senhontulo ĵaras ĉiutage novajn petolaĵojn; kiel ofte vi min jam vundis, mokis kvazaŭ vidvinon, ne timante eĉ vian duonpatron, la bravan kaj grandan bataliston. Cetere, kial vi devus lin timi, se vi, nur por min ĉagreni, kutimas al li liveradi knabinojn? Sed mi jam ĝin faros, ke vi ekpentos pro tiuj ŝercaĵoj, kaj maldolĉa estos al vi ĉi tiu edzeco. Sed kiel mi devas venĝi la lastan malhonoron? Kien direktiĝi? Kiel modestigi tiun sentaŭgulon? Ĉu mi postulos helpon de mia malamikino Sobreco, kiu prave ofendiĝis pro la petoloj de tiu ĉi knabo? Mi sentas abomenon je la nura penso, ke mi devas peti tiun krudan, severan virinon; tamen de kie ajn venos la helpo, oni ĝin devas akcepti, ĉar ĝi ebligas al mi la venĝon. Do al neniu alia, nur al Sobreco mi devas direktiĝi; ŝi moderigu tiun ŝercemulon, sensagigu lian sagujon, malakrigu la sagojn, malstreĉu la pafarkon, estingu la torĉon, lin mem tamen punu per bastono. Mi nur tiam diros, ke mi estas venĝita, kiam ŝi la harojn, kiujn mi iam interplektis per oro, tondos ĝis la haŭto mem kaj kiam ŝi malakrigos la plumojn, kiujn mi sur mia brusto banis en nektaro.“

Post tiuj vortoj ŝi eliras el la ĉambro, kaj ŝian koleran koron plenigas la obstineco. Baldaŭ renkontas ŝin Cerero kaj Junono, kaj

legante la furiozon el ŝia vizaĝo, ili demandas, kial la kolera frunto forigas la belecon de la brilantaj okuloj. Al tio Venuso respondas: „En ĝusta tempo vi alvenas, ĉar mi volas plenumi faron, kiu estas por mi tre grava. Per ĉiuj viaj fortoj helpu, mi petas, elserĉi tiun forkurantan kaj ruzan Psiĥen; ĉar la laŭta famo dissemata pri mia domo kaj la konduto de mia fripona filo estas certe jam de vi konataj.“ La diinoj, sciante efektive pri ĉio, tiel komencis trankviligi la koleriĝantan Venuson: „Kian krimon, sinjorino, plenumis via filo, ke vi perforte al li maldolĉigas la momentojn de feliĉo, ke vi penas mortigi tiun, kiun li amas? Kia krimo ĝi estas, ni demandas, se li ridetis volonte al bela knabino? Ĉu vi ne scias, ke li estas knabo kaj jam maturiĝanta — eble vi forgesis, kiom da jaroj li havas? Tial, ke li bele aspektas, ne kredigu al vi, ke li estas ĉiam infano. Patrino lia kaj prudenta virino vi estas, pro kio do vi scivole spionas ĉiun lian eksceson, riproĉas lin pro malĉasteco, kontraŭbatalas liajn petolaĵojn, pro kio vi viajn proprajn artifikojn kaj ŝercojn mallaŭdas en via bela filo? Kiu el la dioj, aŭ kiu el la homoj permesos, ke vi ĉie dissemu la amon, se vi pro tiu sama amo punas vian propran filon, se vi baras al li la aliron al virinoj?“ Tiel ili, timante la sagojn, petis por Amoro, kaj kvankam li forestis, ili tiel volis akiri lian favoron. Sed Venuso, indignante, ke ili mokas ŝian doloron, foriris kaj per rapidaj paŝoj direktiĝis al la maro.

Dume Psiĥe, sopirante al la edzo, tage kaj nokte serĉis lin en diversaj landoj; ŝi pensis, ke ŝi fine ie lin trovos kaj se ne per edzinaj karesoj, do certe per humila peto ŝi mildigos lian koleron. Ekvidante sur la pinto de alta monto templon, ŝi ekkriis: „Kiu scias, ĉu tie ne estas mia edzo?“ Tuj al tiu celo ŝi direktas siajn paŝojn, ĉe kio la laciĝintan pro senĉesa marŝado plifortigas la espero kaj deziro atingi la celon. Atinginte la pinton, ŝi eniras en la internon de la templo. Ŝi vidas tritikajn spikojn, unujn senorde disĵetitajn, aliajn plektitajn je kronoj, kaj inter ili ŝi rimarkas ankaŭ la spikojn de hordeo. Estis ankaŭ diversaj, el la tuta mondo kolektitaj rikoltiloj, sed ĉio estis disĵetita tie aŭ aliloke, sen iu ordo, kiel ĝin faras ordinare la lacigitaj vilaĝanoj. Ĉion ĉi Psiĥe zorge apartigis kaj poste kunmetis laŭ ordo, ĉar ŝi opiniis, ke ŝi devas malestimigi neniujn diojn, templojn, aŭ kultojn, sed ĉiujn peti pri kompatato. Kiam ŝi diligente pri tio laboris, alvenas al ŝi la nutristino Cerero kaj krias jam de malproksime: „Ho mizera Psiĥe, en la tuta mondo vin serĉas la koleriĝanta Venuso, minacas vin per plej terura puno kaj uzas ĉiujn siajn fortojn, por ke ŝia venĝo povu vin atingi. Dume vi zorgas pri miaj uzaĵoj kaj tute ne pensas pri via propra savo.“ Tiam Psiĥe ĵetis sin al ŝiaj piedoj, surverŝis ilin per torento da larmoj, per siaj haroj ŝi balais la teron kaj per tiuj vortoj petis humile pri protekto: „Je mano via dekstra fruktodona, mi petegas, je la gaja rikoltofesto, je la

mistera korbo, je veturilo via, de drakoj tirata, je la abunde naskanta Sicilio, je la jungaĵo, per kiu oni forrabis vian filinon, je la tero, kiu ŝin kaŝis kaj je ŝia subtera edziĝofesto — je ĉio, kion atika Eleŭzis kovras per mistero, kompatu la petantan Psiĥen kaj helpu ŝin. Permesu, ke mi inter tiuj kolektitaj spikoj povu pasigi kelkajn tagojn, ĝis kiam la tempo mildigos la obstinecon de l' diino, aŭ almenaŭ, ĝis kiam mi elripozos iom post tiel longa suferado.“ Al tio respondis Cerero: „Larmoj viaj kortuŝas min, kaj mi dezirus vin helpi, sed mian parencinon, kun kiu krom tio kunigas min la amikeco, virinon tre estimindan, mi ne povas kolerigi. Tuj do eliru el mia templo kaj estu kontenta, ke mi vin ne haltigis kaj malliberigis.“

Psiĥe ne povis rifuzi, do ekregis ŝin des pli granda malĝojo. Ŝi ekiris pluen, kaj en unu valo meze de malluma bosko ŝi rimarkis templon je neordinara konstruo; volante preterlasi neniun eĉ necertan vojon al espero kaj intencante, kiu ajn diaĵo estus tie, peti ĝin pri helpo, ŝi alproksimiĝas al la sankta pordego. Sur la branĉoj de l' arboj kaj sur la pordego mem ŝi vidas pendigitajn multekostajn donacojn kaj teksaĵojn kun ore broditaj surskriboj; el tiuj oni povis ellegi, pro kiaj bonfaroj oni oferdonis kaj kia estas la nomo de la diino. Ŝi falis sur la genuojn, la varman altaron ĉirkaŭprenis per la manoj, kaj antaŭe forviŝinte la larmojn, ŝi komencis preĝi: „Fratino kaj edzino de la granda Jovo, okupanta

la antikvan templon en Samos, kiu estis honorita per via naskiĝo; vizitanta vian feliĉan sidejon en supra Kartageno, de kie vi estinte virgino leviĝis ĉielen per veturilo, tiritita de leonoj; reganta en la glora urbo de Argivoj ĉe la bordoj de Inaĥo, kie oni jam nomas vin edzino de Tondrojetanto kaj reĝino de la dioj, vi, estimata en oriento kaj adorata en okcidento — helpu min en la malfeliĉo, Protektantino — Junono, liberigu min de timo antaŭ la minacanta danĝero, kompatu min, elĉerpitan de tiel granda suferado. Kiom mi scias, vi kutimas helpi la malfacile naskantajn virinojn.“ Al la tiel preĝanta tuj montriĝas en sia tuta brilo kaj majesteco la diino Junono kaj diras: „Mi sincere dezirus plenumi vian peton, sed agi kontraŭ Venuso, mia bofilino, kiun mi ĉiam amis kiel filinon, nebligas al mi la moraleco mem. Akcepti vin malpermesas al mi tiu sama leĝo, kiu malpermesas doni rifuĝejon al fremdaj sklavoj, forkurintaj kontraŭ la volo de siaj sinjoroj.“

Disreviĝinte ankoraŭ unufoje, perdis Psiĥe la tutan kuraĝon serĉi plu sian forkurantan edzon, ŝi malesperis jam pri ĉio kaj tiel al si parolis: „Kiu povas min helpi en mia doloro, se, kvankam ili volis, tamen ne povis ĝin fari la potencaj diinoj? En reto implikite, kien mi devas direktiĝi? En kia domo, aŭ eĉ en kiaj mallumoj mi kaŝos min, por eviti la penetremajn okulojn de Venuso? Pli bone estos, se mi rekonsciiĝos, forĵetos la vanan esperon, propravole min fordonos en la manojn de la

diino, kaj kvankam malfrua estos mia humileco, ĝi tamen eble mildigos ŝian koleron. Kiu scias, ĉu tiun, kiun mi serĉas tiel longe, mi ne trovos tie, en la domo de l' patrino?" Decidinte esti humila, kvankam tio tute ne garantiis al ŝi bonan rezulton, kaj pli ĝuste dirite, nur pli rapidigis ŝian pereon, ŝi tamen pripensis kiel ŝi devas formuli sian peton pri favoro.

Dume Venuso, lacigita pro la senefika serĉado sur la tuta tero, direktiĝas ĉielen. Ŝi ordonas pretigi la veturilon, plenarte faritan de l' orforĝisto Vulkanano kaj de li oferitan al la edzino inter edziĝaj donacoj. Tuj el inter la multaj kolomboj, havantaj la nestojn apud la dormoĉambro de la diino, alflugas kvar pli blankaj ol neĝo kaj klinas la varikolorajn kolojn sub la brilantan jugon; post kiam la diino okupis la lokon, ili ĝoje malfaldis la flugilojn. Post la veturilo flugas pepante la petolaj paseroj, kaj la ceteraj birdoj per kanto anoncas ĝian alvenon. La nuboj cedas, la ĉielo malfermiĝas por la filino, kaj la supra etero ĝoje akceptas la diinon. Nek aglojn nek la rabemajn falkojn timas la birda anaro de granda Venuso. Tiu ĉi rekte direktiĝas al la reĝa kastelo, al Jovo kaj iom fiere lin petas, ke li donu al ŝi Merkuron kiel heroldon, ĉar ŝi tre bezonas lian servon. Jovo al ŝi ne rifuzas. Ĝojigite forlasas Venuso la ĉielon en societo de Merkuro kaj rakontas al li dumvoje, kio kuŝas sur ŝia koro: „Arkadia frato — ŝi diras — vi scias, ke fratino via, Venuso, nenion

povus fari sen helpo de Merkuro, kaj ankaŭ nun vi bone estas informita, kiel longe mi jam vane serĉas la kaŝigantan knabinon. Nenio do alia restas, nur, ke vi anoncu publike premion al tiu, kiu ŝin trovos. Mian ordonon plenumu senprokraste, atentigu pri la karakterizaj ecoj, laŭ kiuj ŝi povus esti rekonata, ke neniu, kiu eble ŝin kaŝas, povu poste argumenti, ke li ne sciis, al kiu li donis rifuĝejon.“ Dirante tion, ŝi santempe enmanigas al li libreton, en kiu estis skribita la nomo de Psiĥe kaj ĉio alia. Poste ŝi tuj revenis al sia domo.

Merkuro ne prokrastis plenumi la ordonon; kurante tra ĉiuj landoj, li laŭ ordono publikigis, kio sekvas: Se iu haltigos, aŭ ekscios, kie troviĝas la forkurinta reĝidino, servistino de Venuso, nome Psiĥe, tiu venu al Mirtokolono, al heroldo Merkuro; li ricevos kiel premion de Venuso mem sep dolĉajn kisojn kaj inter ili unu je preŝkaŭ nekomparebla dolĉeco.

Kiam tion anoncis Merkuro, la deziro, akiritan premion, tiel ĉiujn ekregis, ke ili komencis serĉi kun granda fervoro. Sed ankaŭ Psiĥe des pli rapidis realigi sian intencitan planon. Kiam ŝi jam alproksimiĝas al la loĝejo de Venuso, renkontas ŝin unu el la servistinoj de la diino, nome Kutimo, kaj tuj ekkrias je la tuta gorgo: „Fine, sentaŭgulino, vi ekscias, ke vi havas super vi estrinon? Eble vi rediros facilanime, ke vi ne scias, kiom ni penadis por vin serĉi? Sed estas bone, ke vi falis ĝuste en miajn manojn; pli bone ne estos al vi eĉ en la ĉirkaŭpreno de la morto, ĉar tuj mi vin

punos pro via krima obstineco.“ En la sama momento ŝi kaptis Psiĥen je la haroj, kaj kvankam tiu tute ne rifuzis iri, ŝi senkompatate tiris, trenante ŝin sur la tero. Je tiu vido komencis Venuso laŭte ridegadi, kiel oni ridas ordinaro en kolero, kaj skuante ĉe tio la kapon kaj gratante la dekstran oreilon, ŝi ekparolis: „Fine vi alvenis al tiu opinio, ke decas saluti vian bopatrinon. Aŭ eble vi venis viziti la edzon, kiu, de vi vundita, estas nun inter la vivo kaj morto? Trankviliĝu, mi akceptas vin tutkore kaj regaloj vin tiel, kiel oni devas regali bonan bofilinon. „Kie estas“ — ŝi ekvokis — „miaj servistoj, Turmento kaj Teruro?“ Kiam ili eniris, ŝi fordonis Psiĥen por torturoj. Tuj plenumante la ordonon de l' estrino, ili komencis la mizerulinon turmenti laŭ ĉiu ebla maniero, kaj poste ili denove ŝin kondukas antaŭ la estrinon.

Tiam Venuso, ree ekridegante, parolas: „Rigardu, ŝi volas per sia gravedeco vekti en mi kompaton, ŝi volas atentigi min, ke, post kiam ŝi naŝkos sur la mondon la gloran infanon, renkontos min granda feliĉo, ĉar mi fariĝos avino. Ho kiel mi estas feliĉa, ke mi en mia floraĝo estos nomata avino, kaj la nepo de Venuso estos filo de ordinara knabino. Tamen mi, senprudenta, vane babilas pri la filo. Ĉar neegala edzeco, kaj krom tio ne sanktigita, sen atestantoj, sen permeso de la patro, ne povas esti laŭleĝa; sekve vi naŝkos bastardon, se ni entute permesos, ke vi ĝin nasku.“

Post tiuj vortoj ŝi alsaltas al Psifĥe, disŝiras sur ŝi la vestojn, senkompate ŝin turmentas, ŝiras ŝiajn harojn kaj batas la kapon; poste ŝi prenis tritikon, hordeon, milion, papavon, fazeolon, lenton, fabon, ĉion ĉi ŝi kunmiksas, faris unu amason kaj diris al Psifĥe: „Ŝajnas, ke vi, malbela knabino, per nenio alia, nur per diligenta servado favorigis al vi la amanton, permesu do, ke ankaŭ mi provu vian diligentecon. Tiujn kunmiksitaĵojn semojn vi devas apartigi, kaj kiam vi el ĉiu speco faros konforman amason, montru al mi ankoraŭ antaŭ la vespero la plenumitan laboron.“ Ordoninte tion, ŝi foriris al edziĝa festeno.

Psifĥe vidis, ke la tasko superas homajn fortojn — ŝi do eĉ ne tuŝis la semojn per la manoj, sed senkuraĝigita pro la sovaĝa ordono, stariĝis en muta rigideco. Tiam unu malgranda kampa formiko, komprenante la malfacilecon de tia laboro, ekkompatis la edzinon de l' potenca dio, komencis malbeni la kruelemon de la bopatrino, kaj ĉien rapide kurante, ĝi kunvokas la tutan anaron de najbaraj formikoj: Kompatu, laboramaj estaĵoj de vivdona tero, kompatu kaj rapide helpu la edzinon de Amoro, la belforman knabinon, kiu nun troviĝas en granda danĝero!“

Alfluas la sespiedaj estuloj unuj post aliaj, kiel ondoj riveraj; kun plej granda diligenteco ili disspecigas la semojn, formas amasojn laŭ la specoj kaj plenuminte la taskon, ili rapide foriĝas. Je l' komenco de la nokto revenis

Venuso de l' edziĝa festeno, ebria de vino, bonodoranta pro balzamo, tute ornamita per belegaj rozoj, kaj ekvidante la plenumitan malfacilan laboron, ŝi ekkriis: „Tio ne estas via laboro, malnoblulino, tion ne faris viaj manoj, sed tiu, al kiu vi plaĉis je via kaj lia malfeliĉo.“ Post tiuj vortoj ŝi ĵetis al Psiĥe pecon da bruna pano kaj foriris ripozi.

Dume Amoro, profunde en la palaco, en ornamita dormoĉambro, pasigis la tempon severe gardata, parte, por ke li ne malhelpu la resaniĝon per petola malĉasteco, parte ankaŭ, por ke li ne povu elŝteliĝi al sia amatino. Tiel do la ambaŭ geamantoj, unu forigita de l' alia, sub tiu sama tegmento kaj dum la sama nokto terure suferis.

Tuj post kiam la matenruĝo kolorigis la ĉielon, vokas Venuso al si Psiĥen kaj tiel al ŝi parolas: „Ĉu vi vidas tiun boskon, kiu etendiĝas laŭlonge de l' apude fluanta rivero? Tie, kie tiu rivero elfluas, paŝtiĝas negardata orlana ŝafaro. Iru kaj tuj al mi alportu unu tufon de tiu multekosta lano.“ Psiĥe iris volonte; ne por plenumi la ordonon, sed por ĵeti sin de la bordo en la ondojn de l' rivero kaj tiel ripozi post ĉiuj turmentoj. Sed ĉe la bordo samtempe aŭdiĝis, milde bruetante, la verda kano, pro dia volo movata per facilaj ekblovoj de la vento: „Spertinte tiom da malfeliĉoj, per morto via ne malhonoru, Psiĥe, miajn sanktajn akvojn, nek je tiu ĉi horo direktiĝu al la teruraj ŝafoj; ĉar kiam regas la suna varmego, ili kutimas furiozi,

per akraj kornoj, per kranio malmola kiel roko, iufoje eĉ per venenaj ekmordoj, minaci la homan vivon. Sed kiam ĉe l' vespero malgrandiĝos la varmego kaj la ŝafaro refreŝiĝos per agrabla venteto, tiam bone vin kaŝu sub tiu alta acero, kiu de tiu sama rivero kune kun mi suĉas la akvon, kaj kiam la ŝafoj ĉesos furiozi, iru en la boskon, inter tiujn densajn arbetojn, kie vi trovos la oran lanon, pendantan en diversaj lokoj sur dornoplenaj branĉoj.“ Tian savantan konsilon donis la sincera, kompatema kano al la malfeliĉa Psifĥe. Sciigita, ŝi ne montriĝis maldiligenta, sed sekvante precize la donitan instruon, ŝi alportis al Venuso grandan amason da ora lano. Tamen malgraŭ la danĝero, kun kiu estis kunigita tiu ĉi dua laboro, ŝi ne trovis aprobon ĉe la estrino, kiu nur sulkigis la brovojn kaj diris kun maldolĉa rideto: „Mi bone scias, ke ankaŭ tiun ĉi laboron plenumis via amato. Sed nun mi jam nedubeble provos, ĉu vi efektive distingiĝas per granda kuraĝo kaj neordinara prudento. Ĉu vi vidas sur tiu fiera roko la abruptan pinton? Sur ĝi, el nigra fonto, akvoj malhelaj elfluas, por trafluante la fermitan valon, refreŝigi la stigiajn marĉojn kaj ŝveligi la laŭte bruantajn ondojn de Kocitos. Tie do, el la fonto mem, ĉerpu la akvon en tiun pokalon kaj tuj ĝin al mi alportu.“ Doninte la ordonon, ŝi enmanigis al Psifĥe glatan kristalan vazon kaj anstataŭ adiaŭi, ŝi insultis ŝin kruele.

Psiĥe senprokraste foriras kaj per rapidaj paŝoj direktiĝas al la monto, por jam unufoje ĉesigi la mizeran vivon. Kaj vere, tuj, kiam ŝi stariĝis apud la roko, ŝi vidas precize, ke plenumante la ordonon, ŝi elmetas sin al certa pereco. Ĉar la ĝis la nuboj leviĝanta ŝtonego, kruta kaj sen iu aliro, eljetas el la mezo de l' abismo grandegajn akvamasojn, kiuj, forlasante la kavon, ruliĝadas malsupren sur la deklivo kaj fine faladas sur la valon kun terura bruego. Dekstre kaj maldekstre insidas en kavernoj, streĉante la longajn kolojn, kortremigaj drakoj, senĉesaj gardistoj, al kiuj la dormo neniam fermas la okulojn. Cetere jam la ondoj mem defendas la aliron per minacaj avertoj; ili ne ĉesas kriadi: „Cedu! — Kion vi faras! — Vidu! — Forkuru! — Gardu vin! — Ne alpaŝu! — Vi pereos!“ Vidante sian senfortecon inter tiel grandegaj malfacilaĵoj, Psiĥe kvazaŭ ŝtoniĝis, tute senkonsciiĝis kaj al la subigita de tiom da danĝeroj eĉ la larmoj ekmankis, la lasta konsolo.

Sed la maljusteco, kiun Psiĥe senkulpe devis suferi, ne kaŝiĝis antaŭ la atentaj okuloj de kompata Providenco. Ĉar jen ekaperis la reĝa birdo de plej alta Jovo, la rabema aglo, balanciĝante en la aero per la etenditaj flugiloj kaj memorante la komplezon de Amoro, kiam Jovo ordonis forrabi la Frigian knabon, ĝi nun rapidis, por pro dankemo al la dio helpi en la malfeliĉo lian edzinon; forlasinte la ĉielajn sferojn, ĝi alflugis al

Psife kaj parolis: „Ho vi naiva kaj nesperta, kiel vi povas esperi eĉ unu guton elŝteli el tiu sankta, sed terura fonto, aŭ nur entute al ĝi alproksimiĝi? Ĉu vi aŭdis neniam, ke eĉ Jovo mem timas la Stigiajn akvojn, kaj ke, kiel vi ĵuras pro la dioj, tiel la dioj kutimas ĵuri pro l' sankteco de Stikso? Sed donu al mi la pokalon.“ Tion dirante, ĝi kaptis la vazon kaj rapide forflugis, por ĝin plenigi per akvo. Remante en la aero per potencaj flugiloj, ĝi evitas ĉe ambaŭ flankoj la dentarmitajn buŝegojn kaj la tripintajn langojn de la drakoj, kaj poste, kvankam ili furiozis kaj minacis, ĝi ekĉerpis la akvon, mensogante, ke ĝi faras tion pro ordono de Venuso; per tiu artifiko ĝi tre faciligis al si la aliron. Kun ĝojo akceptis Psife la plenigitan pokalon kaj rapide alportis ĝin al Venuso.

Sed ankaŭ nun ŝi ne povis mildigi la koleron de l' diino, kiu, preparante por Psife ankoraŭ pli grandan kaj venĝoplenan punon, vokas ŝin al si kaj moke ekparolas: „Verdire, certe vi estas sorĉistino aŭ iu malbona spirito, ĉar vi tiel rapide plenumis mian ordonon. Nun, amata mia infano, vi faros al mi ankoraŭ unu komplezon. Prenu tiun skatolon — kaj ŝi donis ĝin al ŝi — tuj direktiĝu al la infero, al la terura palaco de Orko, kaj donante la skatolon al Proserpino, tiel ŝin alparolu: „Venuso petas vin, ke vi sendu al ŝi iom da via beleco, eĉ nur tiom, kiom sufiĉas por unu tago; la antaŭan belecon ŝi tute perdis, flegante sian malsanan Amoron.“ —

Sed baldaŭ revenu, ĉar mi tre bezonas tiun ĉi belecon, por povi aperi en dia kunveno.”

Tiam Psiĥe jam bone komprenis, ke venis al ŝi la lasta mizero, ŝi vidis ja plej evidente, ke ŝi iras renkonte al certa pereco. Ĉu ne estis tiel? Jen ŝi ricevis la ordonon, per propraj piedoj iri al Tartaro, al la mortintoj. Kaj ne prokrastante jam plu, ŝi direktiĝas al iu tre alta turo, volante de ĝia pinto ĵeti sin malsupren; ŝi opiniis, ke ŝi tiel plej rapide kaj certe trovos la vojon al la subtera lando. Sed subite la turo jenmaniere al ŝi komencis paroli: „Kion vi intencas, malfeliĉa? Ĉu falante de supre vi volas perdi la vivon? Pro kio facilanime elmeti sin al ekstrema danĝero? Ĉar, se jam unufoje foriĝos la spirito de la korpo, vi certe iros al la profunda Tartaro, sed vi povos neniel de tie reveni. Do aŭskultu min atente. Ne tre malproksime kuŝas la glora greka urbo Lacedemono, en kies najbareco, flanke kaj en loko kaŝita, troviĝas Tenarum. Tie estas la eniro al la infero, kaj tra la tute malfermita pordo oni vidas krutan vojon; kiam, trairinte la pordon, vi ĝin surpaŝos sen sento de timo, jam certe vi atingos la palacon de Orko. Sed kun nenio ne iru tra tiuj mal-lumoj: en ambaŭ manoj tenu hordean panon kun mielo kaj du monerojn en la buŝo. Kiam nur restos duono da vojo, vi renkontos lamantan, per ligno ŝargitan azenon kaj ĝian ankaŭ lamantan peliston, kiu vin petos, ke vi levu kelke da falintaj faskoj. Vi tamen, dirinte nenion, preterpasu lin silente. Baldaŭ poste

vi atingos la riveron de la mortintoj, kie Ĥarono postulos de vi la monon kaj transveturigos vin sur la alian bordon en flikita boato. La mortintoj ankaŭ estas monavidaj. Kvankam Ĥarono estas tre potenca, li tamen nenion faras senpage kaj eĉ la malriĉulo devas post sia morto pagi al la remisto. Al tiu malpura maljunulo vi donos unu moneron, aŭ pli ĝuste el via buŝo li ĝin prenu mem. Kiam vi troviĝos sur la mezo de la malrapide fluanta rivero, iu maljuna mortinto post vi naĝos kaj etendante la velkintajn manojn, vin petegos, ke vi prenu lin en la boaton. Vi tamen ne devas esti kompatema. Kiam vi atingos la alian bordon kaj ekiros pluen, maljunaj ŝpinistinoj okupitaj de ŝpinado petos vin, ke vi por momento almetu la manon al ilia laboro. Vi tamen eĉ ne devas ĝin tuŝi. Ĉar ĉio ĉi estas nur insido de Venuso, por ke vi faligu la mielpanon aŭ nur unu ĝian peceton. Kaj ne pensu, ke la perdo de kelkaj paneroj malmulte valoras; perdinte ilin, vi al vi mem nebligis la revenon al la mondo. Ĉar grandega trikapa hundo, sovaĝa kaj kruela ĉiam kuŝas antaŭ la sojlo de la malluma loĝejo de Proserpino, kaj timigante la mortintojn per tondrosimila bojado, ĝi gardas la teruran palacon. Preter ĝi, furiozanta pro kolero, vi iros facile, ĵetinte antaŭe peceton da pano. Poste vi direktiĝos al Proserpino mem, kiu vin akceptos afable kaj favore; ŝi petos, ke vi sidiĝu sur mola seĝo kaj ĝuu abundan matenmanĝon. Sed vi sidiĝu sur la tero, petu

pri bruna pano kaj poste anoncu la kaŭzon de via vizito; preninte tion, kion oni al vi donos, revenu, mildigu la koleron de la hundo per restintaj panpecoj kaj donu la duan moneron al la monama remisto. Tiam vi ree transveturos la riveron kaj eliros sub la lumon de la suno. Sed antaŭ ĉio mi atentigas vin, ke vin ne ekregu la deziro malfermi la portatan skatolon, aŭ nur esplori la hermetike fermitan trezorujon de l' dia beleco.“

Tiel klarigis la estontecon la saĝa voĉo el la turo. Psiĥe senprokraste direktiĝas al Tenarum kaj provizinte sin laŭ ricevita konsilo je pano kaj moneroj, ŝi eniras en la inferon; silente ŝi preteriras la lamantan azenon, donas unu moneron al la remisto, malatentas la petegojn de la post ŝi naĝanta mortinto kaj rifuzas la ruzajn allogojn de l' ŝpinistinoj — fine ŝi mildigas per pano la teruran furiozon de l' hundo kaj eniras en la loĝejon de Proserpino. Ŝi ne akceptis de l' gastama mastrino kusenon seĝon, nek dian manĝaĵon, sed sidiĝis humile ĉe ŝiaj piedoj, kontentigante sin per bruna pano kaj anoncas la kaŭzon de sia vizito. Tuj ŝi ricevas plenigitan kaj mistere fermitan skatolon. Poste, kiam per resta pano ŝi trankviligis la hundon kaj per la dua monero pagis al la remisto, esperplene ŝi eliris el la infero. Jam ree ŝi ekvidis kaj kun ĝojo salutis la tagan lumon, kiam subite ekregis ŝin senpripensa facilanimeco. „Ho, kiel mi estas malsaĝa — ŝi diris — mi portas dian belecon kaj eĉ tiom mi ne prenas de ĝi, ke mi povu

plaĉi al mia amanto.“ Tion dirinte, ŝi malfermas la skatolon. Tie estis nenio, nenia beleco, nur infera, vere Stigia dormo, kiu liberiginte de l' kovrilo, kaptis Psifien kiel densa dormiga nubo, ĉirkaŭis ĉiujn ŝiajn membrojn kaj tuj ilin rigidigis. Kaj ŝi kuŝis senmove kvazaŭ malvarma kadavro. Sed Amoro jam resaniĝis, kaj ne povante elteni la longan forestadon de sia Psifie, el la ĉambro, kie li estis malliberigata, li elŝteliĝis tra la supra fenestro. Pli rapide ol iam li leviĝis per la flugiloj, kiuj post longa ripozo refariĝis fortoplenaj. Baldaŭ li alproksimiĝis al Psifie, zorge deprenis de ŝi la dormon kaj vekis ŝin per nedanĝera ekpiko. „Jen denove — li diris — pereigis vin la scivolo. Sed rapide plenumu la ordonon, kiun donis al vi la patrino; mi jam prizorgos la ceterajn aferojn.“ Post tiuj vortoj, remetinte la dormon en la skatolon, li leviĝis supren, Psifie tamen prenas la donacon de Proserpino kaj tuj ĝin alportas al Venuso.

Dume la kompatinda Amoro, konsumata de pasia amo, timante, ke la patrino redonos lin en la manojn de l' rapida Sobreco, denove uzas artifikon; elfluginte per lertaj flugiloj al la supro de l' ĉielo, li direktiĝas kun humila peto al Jovo kaj prezentas al li sian aferon. Tiam Jovo ekkisis lian buŝon kaj diris. „Kvankam vi, mia filo, neniam kondutis ĉe mi obeeme, kiel la ceteraj dioj, sed min, kiu regas la leĝojn de l' elementoj kaj direktas la vojojn de la ŝteloj, vi ofte vundis per piko de

sago, ofte implikis en amaĵojn sur la tero, vi faris, ke mi pekis per adultoj kontraŭ la leĝoj kaj la publika moraleco, pro via kaŭzo rakontas pri mi la homoj ne ĉiam belajn historiojn, vi min, dion kun serena vizaĝo, ofte aliigis en serpenton, fajron, cignon, bovoviron: malgraŭ tio tamen mi memoros nur pri via alligiteco al mi kaj pri tio, ke vi edukiĝis sub miaj okuloj, do mi plenumos vian peton. Memoru tamen, se iu tera knabino ekfloros per beleco kaj ĉarmoj, doni ŝin al mi, rekompencante tiel mian nunan komplezon.“

Tion dirinte, li ordonas al Merkuro, tuj voki ĉiujn diojn al kunveno kaj anonci, ke, kiu el la ĉielanoj mankos en la kunveno, tiu devos pro puno pagi dek milojn da dukatoj. Kiam, timante la punon, ĉiuj dioj alvenis kaj okupis siajn seĝojn en la ĉiela teatro, tiel ekparolis Jovo, sidante sur altega trono: „Dioj, cititaj en la katalogo de Muzoj, vi ĉiuj konas tiun junulon, edukitan sub miaj okuloj; liajn pasiajn eksplodojn de l' unua amo oni devas iel sufoki laŭ mia opinio. Sufiĉe jam lin malhonoris la ĉiutage alvenanta famo pri liaj adultoj, diboĉado kaj ceteraj krimoj. Oni devas forigi ĉiun bonokazon por tio kaj ligi la junulan facilanimecon per la ligoj de l' edzeco. Li jam elektis al si amatinon; li edziĝu al ŝi, en la ĉirkaŭprenoj de Psiĉe li eterne ĝuu la voluptojn de l' amado.“ Poste, direktiĝinte al Venuso, li diris: „Sed ankaŭ vi, filino, ne malĝoju pri via tiel potenca familio — ne timu boparencecon kun mortema knabino. Mi jam

konforme al la leĝo egaligos la geedzojn.“ Senprokraste li ordonas al Merkuro venigi Psiĥen en la ĉielon — li donas al ŝi pokalon plenan de nektaro kaj diras: „Prenu, Psiĥe, kaj fariĝu nemortema! Jam neniam forlasos vin Amoro — vi estos lia edzino por ĉiam.“

Tuj oni preparis grandiozan festenon por la edziĝofesto. La plej altan lokon okupis Amoro, alpremante al si Psiĥen, apud ili sidis Jovo kun sia Junono kaj poste laŭvice la ceteraj dioj. Tiam la pokalon kun nektaro, la vino de l' dioj, donis al Jovo lia amata Ganimedo, al aliaj servis Bakĥo. Vulkanio kuiris la manĝaĵon, Horoj per rozoj kaj aliaj floroj ĉion plibeligis, Gracioj parfumis la aeron per balzamo. Muzoj per sia agrabla voĉo amuzis la gastojn, Apolono kantis ĉe l' sonoj de citro, kaj Venuso ĉarme dancis laŭ la takto de melodia muziko. La scenejan ludon oni aranĝis tiel, ke Muzoj kantis ĥore, Satiro trilis sur la fluto, kaj Pan fajfis sur la ŝalmo. Tia do estis la edziĝofesto de Amoro kaj Psiĥe, kaj baldaŭ naskiĝis al ili filino, kiun ni nomas Volupto.

F i n o.

Esperanto-Verlag
Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Dokumentoj de Esperanto

*Informilo pri la historio kaj organizo de la
Esperanta movado*

Kunmetita de
Dro A. Möbusz, Lübeck

Prezo 3.— Gm.

Ĉiu Esperantano, kiu volas informi sin pri la historio kaj scienca bazo de la Lingvo Internacia, pri la Esperanto-movado kaj pri la organizo de la Esperantistaro, nepre devas posedi ĉi tiun fundamentan verkon. La libro enhavas i. a. ĉiujn kongresparoladojn de Dro Zamenhof kaj multajn aliajn gravajn dokumentojn. Ĝi estas tre necesa preparilo por Esperantaj ekzamenoj.

Esperanto-Verlag
Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

R. de Ladevèze

Demandaro

*pri la Historio, Literaturo kaj Organizaĵoj
de Esperanto por Esperantaj Ekzamenoj*

Dua eldono
reviziita kaj kompletigita de
Prof-ro Dro Göhl

Prezo 1.20 Gm.

Ĉi tiu grava verko estas necesega precipe por tiuj Esperantistoj, kiuj volas prepari sin por Esperantaj ekzamenoj, kaj kune kun la „Dokumentoj“ de Dro Möbusz ĝi estas la plej bona preparilo. Ĝi nepre troviĝu en la biblioteko de ĉiu Esperantisto.

Demonstraciaj Tabeloj

pri la konstruo de la lingvo Esperanto

Helpilo por propagandaj paroladoj kaj
la Esperanta instruado. Laŭ didaktikaj
vidpunktoj kunmetis

Dr. phil. A. Möb us z

Formato 80×106 cm.

Tuta serio (8 tabeloj) 4.— Gm.

En h a v o :

I. La alfabeto. — II. La deklinacio. — III. La numeraloj. — IV. La formaj vortoj. — V. La verbo (ĉefaj formoj). — VI. Konjugacia tabelo laŭ latina skemo. — VII. La afiksoj. — VIII.

Esperanta prova teksto por legado
kaj tradukado.

* * *

Ĝis nun estis pli-malpli malfacile, montri al la publiko dum propaganda parolado la simplan konstruon kaj la regulecon de nia lingvo. Tiun postulon plenumas la „Demonstraciaj Tabeloj“ en plej bona maniero. Aliflanke la tabeloj plenumas ŝatindajn servojn dum la instruado precipe se tiu lasta okazas en ĉambro, kie ne estas murtabuloj je la dispono de la instruanto. La aranĝo estas klara kaj la skribo sufiĉe granda, tiel ke eĉ en grandaj ĉambroj la tabeloj estas uzeblaj.

Esperanto-Verlag Eilersiek & Borel G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden

Nova Esperanto-Biblioteko

Noj. 1-4 estas primilitaj publikigaĵoj de Germana Esperanto-Servo, kiuj nun malaktualiĝis.

No. 5. **Argus: Pro kio?** Internacia kriminalromano originale verkita.

No. 6. **Heine, Heinrich: Elektitaj Poemoj.** El germana lingvo tradukis Friedrich Pillath. Dua, kompletigita eldono.

No. 7. **William, P.: Legolibro.** Ia volumo: Internacia Anekdotaro.

No. 8. **Hauff, Vilhelmo: La kantistino.** Novelo. El germana lingvo tradukis Eugen Wüster.

No. 9. **Lessing, Gotthold Ephraim: Natan la Saĝulo.** Drameca poemo en kvin aktoj. El germana lingvo tradukis K. Minor.

No. 10. **Elin-Pelin: Elektitaj Rakontoj kaj Prozversaĵoj.** El la Bulgara tradukis Ivan H. Krestanoff. (En preparo.)

Ĉiuj volumoj estas bele kartonitaj.

Prezroj laŭ nia plej nova katalogo.

(La kolekto estas daŭrigota.)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.
Berlin kaj Dresden

KUL

V-M189/12
(1924)

ERNACIA

o de la Ora
hn Ruskin, el
o tradukis Ivy
M., Ph. Dr.

Fr. Skeel-Giörling.

No. 3. Bona Sinjorino, novelo de E. Orzeszko, tradukita el pola lingvo de Kabe.

No. 4. Rusaj Rakontoj de Mamin Sibirjak, tradukitaj el rusa lingvo de N. Kabanov.

No. 5. Don Kihoto en Barcelono, tradukita el hispana lingvo de Fr. Pujulá y Vallés.

No. 6. El la Biblio, trad. Dro L. L. Zamenhof.

No. 7. El Dramoj (fragmentoj), tradukitaj el germana lingvo de Dro L. L. Zamenhof.

No. 8. El Komedioj (fragmentoj), esperantigitaj de Dro L. L. Zamenhof.

No. 9. Praktika Frazaro. Dialogoj de la ĉiutaga vivo, kunmetis J. Borel.

Noj. 10-11 (duobla numero). Japanaj Rakontoj. El japana lingvo kunmetis Ĉif Toŝio.

No. 12. Amoro kaj Psiĥe de Lucius Apulejus, el latina lingvo trad. Emilo Pfeffer.

No. 13. Bulgaraj Rakontoj, el bulgara lingvo tradukis At. D. Atanasov.

Noj. 14-15 (duobla numero). Reaperantoj. Familia dramo de Henrik Ibsen, trad. el norvega lingvo de O. Bünemann.

No. 16. Komerca Korespondo, kunmetis J. Borel.

No. 17. Konsiloj pri Higieno, tradukis J. Borel.

No. 19. Sinjoro Herkules. Unuakta burleskaĵo de Georg Belly, el germana lingvo tradukis H. Arntz kaj M. Butin.

No. 20. La lasta Usonano de J. A. Mitchell, el la angla lingvo trad. Lehm. Wendell.

No. 21. Hungaraj Rakontoj de Ferenc Herczeg, el hungara lingvo trad. A. Panajott.

No. 22. Nord-germanaj Rakontoj de Heinrich Bandlow, el platgermana lingvo tradukis Ella Scheerpeltz.

No. 23. Hispanaj Dramoj de Jacinto Benavente, tradukis Vicente Inglada.

No. 24. La Instituto Milner de Jean Jullien. Trad. el franca lingvo la Lyon-a Grupo.

No. 25. Noveletoj el la Nigra Arbaro de Hel. Christaller. Trad. el germana lingvo Wilh. Christaller.

No. 26. La intervidiĝo kaj Nekoniĝo Dialogo de Alfred de Vigny, el franca lingvo trad. Sam. Meyer.

No. 27. La Patrino de E. Zahn. El la Germana trad. J. Šmid.

No. 28. Elzasaj Legendoj. El germana lingvo tradukis Charlotte Pulvers.

Noj. 29-31 (triobla numero). Sub la Neĝo. Taglibro de juna ioganto de la Jura-montaro de J. J. Porchat, el la Franca trad. J. Borel.

No. 32. La Amkonkurantoj. Triakta komedio, originale verkita de Reinhold Schmidt.

Prezoj laŭ nia plej nova katalogo. La kolekto estas daŭrigota.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel GmbH.,
Berlin kaj Dresden